



# PENSEO

N-ro 342

apr. / 2020

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Rita Mkrtchyan (Armenio)



### Amike al unu el bonegaj verkistinoj — Julia Sigmond

Senlacaj manoj verkas, skribas,  
Disdonas la belecon kaj bonecon,  
Eterna sent' plenigas koron,  
Valoras pli ol la arĝent' aŭ oro.

Rigardo laca, la ridet' mistera,  
Multkolorigas tagojn grizajn,  
Animon tuŝas vort' sincera,  
Eĉ, se ne estas Mona Liza.

Okuloj iĝas diafanaj pro la larmoj  
Kaj en la strofoj— tuta viv' per "skizoj",  
Ŝi "pentras" siajn pensojn sur la paĝoj,  
Eĉ, se ne estas Mona Liza!



Marto 10

\* Du el ŝiaj belegaj poemoj mi tradukis armenlingve.

## Rememoro pri Julia Sigmond

En nia Esperanta vivo ni renkontas multajn samideanojn, iujn ni ekvidas kaj konatiĝas, aliujn ekkonas per korespondado. Sed, estas interese, ke nur en Esperantujo (mi pri ĉi-tio jam skribis kaj parolis) la amikeco preskaŭ ne finiĝas (eble estas nur kelkaj

esceptoj). En rondo de similaj homoj ni povas renkonti verajn amikojn, homojn, kiuj iĝas proksimaj de unua saluta vorto, rideto, interparolo, letero.

El ĉi tiuj homoj estis Julia Sigmond. Ŝia enmeto en originala kaj traduka Esperanta literaturo estas granda kaj valora. Ŝi estis premiita en Belartaj konkursoj, verkis kaj eldonis siajn poemojn, rakontojn, novelojn preskaŭ ĝis la fino de la vivo. Eble pri ĉi-tio rakontos, skribos esperantistoj, kiuj pli bone konis faman verkistinon persone. Mi konas ŝin per leteroj, per korespondado. Ŝia alvoko –Kara amikino – estis tiel varma kaj sincera, same, kiel ŝiaj poemoj kaj rakontoj. En ŝia rakontvolumo *Mi ne estas Mona Liza*, en poemoj, estis sentebla kaj kredo al pli bona estonto, kaj espero, kaj sopiro, kaj doloro.

Julia Sigmond tre ŝatis konversacii kaj per la verkoj, kaj per korespondado. En ŝia *La Skribistino* ŝi mem skribis – La korespondado iĝis mia ĉefa hobbio. De unua ŝia retletero aperis sento, ke ni amikiĝis antaŭ multaj, multaj jaroj, kaj povis pri ĉio konversacii. Ŝi estis bonrilata kun ĉiuj korespondamikoj. Kiam mi tralegis ŝiajn verkojn kaj tradukis la poemojn, mi komprenis, ke ne tiel multas apud ni la homoj, kiuj parolas ne nur per lipoj, sed ankaŭ anime. Iam mi sendis unu el miaj modestaj poemoj al la korespondamiko, kaj li skribis – Dankon pro konfido. Jen la vorto, per kiu mi povas karakterizi Julia Sigmond. Ŝi estis konfidema kaj sincera, estis fidela kaj al Esperanto, kaj al la agado de ŝia tuta vivo, kaj al siaj familianoj, kaj al la geamikoj.

Ni vivas en ege malfacila tempo, ĉiutage informiĝas pri tragikaj novaĵoj, sed ni bezonas

dum vivo bonajn, belajn verkojn. Homa koro atendadas lumon de varmaj, amikaj vortoj. Similan lumon donacis al ni Julia Sigmond, kies libretoj ŝajne estas en biblioteko de multaj esperantistoj, ĝojigos nin ĉiam!

**Rita Mkrtyan**

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



## Kuraĝo

*Eĉ kiam mi iros tra valo de densa mallumo, mi ne timos malbonon, ĉar Vi estas kun mi; Via bastono kaj apogilo trankviligos min. (Psalmo 23:4)*

En la skatolo mistera  
de la bela Pandora  
ankoraŭas espero,  
la parfumo el ĝojo,  
kiu nutras kuraĝon,  
kaj fortigas la koron.

*Juiz de Fora, 13/02/2020.*

## Vidpunkto

*Tial ankaŭ ni, havante ĉirkaŭ ni tian nubegon da atestantoj. (Hebreoj, 12:1)*

Ni vivas trempitaj  
en la penso de Dio;  
tamen multaj el ni  
estas ribelemaj fiŝoj,  
kiuj ĉiam neadas  
la ekziston de l' oceano.

*Juiz de Fora, 15/02/2020.*

## Eto (Ĉinio)

## Aprile

Printemp' alvenas kun paletro kaj peniko.  
Ŝi farbas montojn plene verde kun tenero,  
kaj ŝmiras per junverd' la ŝosojn de saliko,  
junverde herbojn laŭ la bordoj de rivero.

La ruĝon donas ŝi al floroj de persiko,

la blankon al prunfloroj en la ventleĝero,  
hel flavon al sovaĝaj floroj per liriko,  
kaj brilan bluan malavare al ĉielo.

Sur kampoj oni plugas teron laboreme,  
kaj sarkas, semas ja senĉese dum taglumo,  
dumnokte babiladas en la hejm' senĝene.

Kvazaŭ komforte en printempa la brakumo  
sin kaŝas ili en varmejo senĉagrene  
kaj ĝuas familian ĝojon sub la luno.

## Yanke (Ĉinio)

## Nia komuna malamiko

Ne parolu pri la rasoj blanka, flava kaj nigra,  
nek pri virineco, vireco kaj infaneco,  
nek pri maljuneco kaj juneco,  
nek pri ranguleco kaj plebaneco,  
nek pri riĉeco kaj povreco,  
nek pri la disvolvinteco kaj disvolvanteo,  
nek pri antaŭeco kaj postiginteco,  
ĉar ĉiuj belaj kaj fatasstaj vortoj  
fariĝas polvo kaj nenio.

Viruso, kronviruso, nova kronviruso  
jam voras ĉion sendistinge.

Ĝi forprenas vivojn de homoj  
blankaj, flavaj kaj nigraj,  
inaj, viraj kaj infanaj,  
junaj kaj maljunaj,  
riĉaj kaj malriĉaj,  
altrangaj kaj sensignifaj.

Ĝi invadas ĉiujn angulojn de la mondo,  
turmentas kaj murdas ĉion kaj ĉiujn  
kruele, tirane, malvarmsange kaj senkomplete.

Antaŭ ĝi neniu ĝuas rajton, liberecon  
iri, paroli, manĝi, vojaĝi, eĉ seksumi.

Viruso, kronviruso, nova kronviruso  
konstruas tombojn, tumulojn, sepultejojn  
por ni ĉiuj, por la tuta homaro.

Ĉu vere gravas oro, petrolo kaj aliaj riĉaĵoj?!

Kial lanĉi militon al samvilaĝanoj de l'  
terglobo?!

Neniu pli potencas ol la viruso,  
 neniu pli avantaĝas ol la viruso,  
 neniu pli antaŭas ol la viruso!  
 Ho, homidoj, vi ĉiuj eraras, misas kaj trompas  
 vin mem.  
 Vekiĝu, forĵetu iluzion kaj turnu  
 viajn pafilojn kaj kanonojn al la demono,  
 al nia komuna malamiko,  
 viruso, kronviruso, nova kronviruso!

## Hans-Georg Kaiser (Germanio)



### Vipino

Vipino blonda, tre senpruda,  
 tra strato iris tute nuda.  
 La viroj miris stulte gape,  
 sed ŝia vipo krakis frape.

La belulino kun la vipo  
 ne zorgis sin pri onta gripo,  
 ŝi fiajn knabojn batis krude,  
 volupte, tamen preskaŭ lude.

Ne ĉiuj trovis tion aĉa,  
 doloro estas ankaŭ plaĉa.  
 Se belulin' la vipon svingas,  
 virsklavojn tio eĉ distingas.

Adoras viroj tentajn sinojn  
 kaj kompreneble fortajn inojn.  
 Se al virvir' la felo jukas,  
 sovaĝofloron li sin plukas.

### Cirkokomenco

Tion ni spertis ĉiuj:  
 La cirko estas veninta!  
 Jam staras la grandega tendo,  
 ĉie ekbrilas la lumĉenoj,  
 kaj sur la pinto de la tendo  
 lumas alloge la nomo de la cirko.  
 Post la balustrado oni aŭdas jam  
 la trumpetadon de elefanto,  
 el karavano de la cirkartistoj

elsonas sentimentala buŝharmoniko.  
 Ni jam staras en la vicoj kaj  
 ŝovas kaj puŝas nin antaŭen.  
 Tiam ni sidiĝas inter la stangoj kaj  
 mastoj,  
 tiel, ke ni bone povas vidi ĉion,  
 ĉar la cirko estas la plej bela  
 el ĉiuj lumfestoj por la okuloj.  
 La atmosfero estas ekscitiga.  
 La orkestro elprovas iun viglan  
 latinan ritmon kaj de la maneĝo  
 eliras la tipa cirkodoro.  
 Ni nun fariĝas dum momento  
 eĉ iomete sentimentalaj,  
 kiel la poeto Rilke:  
 "Kiuj estas tiuj vagantaj veturantoj,  
 kiuj eble estas ankoraŭ iom pli  
 fuĝemaj ol ni mem?"

Sed tiam la prezentado jam  
 komenciĝas.



## Papos Nascentes (Brazilo)



### Senmemorigita

senvestigita de mi mem  
 senmemorigita  
 dum kiom eonoj mi vagas  
 de stelo al stelo  
 de intertempo al intertempo?

intergalaktika sen festvesto  
 pompo preparo mi intuas min alvokita  
 kvazaŭ par' kaj parto:  
 andromedano plejadano  
 vegao min postulas sirius' min kunvokas

senmemorigita kaj sendirekta  
 polusa stelo norton min ne donas  
 daŭre mi ruliĝas tra iluzia nokto  
 de mia volonta blindo:  
 kiu bizara popol' min elaĉetos  
 dum ekstazo diskreta?  
 kaj min koncedos vibre  
 la legitiman habeas corpus  
 de lumoj briloj kaj koloroj  
 ĉe mia kontaĝa renovigo?

## Siv Burrel (Svedio)



### Manko de loĝejo

Manko de loĝejo—ho, melankolie!  
 Propra apartamento ie  
 certe plej valoras,  
 sed ne akceptu promeson kiel fakton  
 ĝis fine vi subskribis la kontrakton!

Sur sofo de kamarado dormi  
 ne bonas por malriĉa student'!  
 Aŭtoritatoj povas eĉ ne informi  
 pri longeco de loĝejatend'.

Politiko estas arto de elekto,  
 do elektu, ke ĉiu hom'  
 per domkonstruada direkto  
 havos rajton de propra dom'!

## Ĉuisto (Ĉinio)



### Gardi la belan tempon

mi renkontiĝas kun vi juna  
 en mia sonĝo nuna  
 sur mian vizaĝon kun rideto  
 tra la ombro de folioj  
 versiĝas la radioj  
 lasu min proksimiĝi al vi kun pasio  
 la ĉarma figuro kaptita de fotilo  
 similas la subtilan brizon  
 ĝi alŝvebis al mi kun via aromo de lipoj

lasu vian koron de orf-solo  
 droni en ekstazo de neono  
 kaj ebriiĝi en la nokto de luna paradizo



mi renkontiĝas kun vi juna  
 kvazaŭ en antaŭa sonĝo  
 ankaŭ restas via spuro nuna  
 en mia koro  
 ĝi tuj vekas ĉe mi vian mutan volon  
 en venontaj tagoj kiel la neĝflokaj  
 flirtos en ĉielo senlima  
 pro la sincereco de koro ama  
 kiu min varmigas kiel pasio flama  
 trans mia ora horo

## Elena Popova (Bulgario)



### Kelkaj enigmoj

1.  
 Kun la longa rostro  
 kaj grandaj oreloj,  
 vere tiu besto  
 ne estas eleganta.  
 Sed necesa helpanto  
 estas la giganto  
 (elefanto )

2.  
 Sur la herbetoj,  
 aŭ la ŝtonetoj,  
 sur la ter' malmola  
 aŭ en la domoj,  
 rapidas sola  
 aŭ en kolono  
 kun amikoj  
 la  
 (formiko)

3.  
 Laŭ la fabeloj  
 supertera belulin'  
 vivas en la riveroj,

la arboj kaj floroj.  
 Ĝi ĉarmas la koron  
 dum meznokta horo.  
 Kiu kaŝas en la nom'  
 de l'

(feliĉulin') ?

4.  
 Iras petole,  
 muzikas vole,  
 portas ĝojon  
 en l'animoj.  
 Vintre malriĉa,  
 somere riĉa –  
 inter la floroj  
 per muzikilo  
 muzikas

(grilo)



## Jadranka Miric (Serbio)



### Kajkoj

Varmega tago.  
 Jen, meze de la vintro  
 ekfloris konval'.  
 \* \* \*  
 Tra branĉaro ho,  
 vidiĝas blua ĉiel'.  
 Bluiĝas nokto.  
 \* \* \*  
 Marta krepusko.  
 Flava lantern' aperas  
 sur griza ĉiel'.  
 \* \* \*  
 Ruĝiĝas ĉiel'.  
 Subite fi ventego

redonas vintron.

## Cecília Meireles

### Eĉ Dio taksis ĝin feliĉo

Elkanta mia sufero  
 tiel dolĉis laŭ la vorto,  
 serenigis laŭ l' maniero,  
 ke eĉ al Di' mia sorto  
 ŝajnis ĝuo ne sufero.

Orliraj ĉiuj anĝeloj'  
 kun klin' en alta apreco.  
 Ter' tuta pro l' voĉfajneco  
 min enviis, kaj "de l' steloj"  
 diris "neprestas ĝi peco"

Mi vekis ulojn en dormo,  
 mortintojn mi suspirigis.  
 Ĝoj' laŭ ĉielark' post ŝtormo  
 el mia buŝo sinleve:  
 Viv' kaj songo sin plenligis.

Iĝis ĉe l' mister' de l' kanto  
 sen vid' vi, Dio sen scio...  
 Mirindega plordonanto:  
 - ĉiuj sorĉitaj de l' ĉanto,  
 nur mi en tristagonio!

Tiel dolĉan sinprezenton  
 de mia sufer' en verso  
 volis Di', mian lamenton  
 donu ke la Universo  
 el ĝi verŝu ĉi kontenton!

*Elportugaligis*



### Wel CR (Brazilo)

## Yu Xiuhua

### La vento blavis tra l'kamparo

mi petas esti infaneto de l' ĉielo,

eĉ se ŝi reprenus miajn flugilojn de l'koro.

mi promenas tra l' kamparo en profunda vintro,  
la vento blovas la nuancojn de ĉi tiuj tagoj.  
la vinglaso falis, sed neniuj ĝin restarigis,  
mi jam ebriiĝas en la foro,  
la mieno jam flaviĝas.

la tritiko ekverdiĝas kun soleco,  
lasu min atingi la venontan primaveron.  
iu ombro cxiam staras sur la kampo,  
nun mi volas fumi.

kiam ruĝa sorgo estas jam hejmvreveninta,  
kiom sentoj de hejmloko estas por mi?  
ekzistado sidas sur la tablo kun fer-incensuoj.  
miajn amon kaj malamom  
mi tro timas plu mencii

jen la vento blovas min pli kaj pli suben,  
ĝis mi enŝlimiĝas por elĉerpi akvon.  
mi esperas esti l' infaneto de l' ĉielo,  
kiel se  
mano povus tuŝe atingi.

*Elĉinigiŝ*



**Ardo (Ĉinio)**

**Gao Huaijun**

**Nova Tago**

en nova tago  
mi la hieraŭajn aĵojn  
forigos ja senspure  
kun la sento atendema  
donos mi al mia sopirata homo  
ian senparolan forton

kiel alumetvendanta la knabino  
mi per unu alumeto  
vin varmigas en la vintro  
kvankam feblas ĝia lumo  
sed

mi klopodos kiel eble plej multe  
jen alporti al vi lumon en malhelo  
lasi vin aŭskulti  
vokojn de espero  
por ke via revo  
ne vanuu kaŝe el de miaj fingropintoj  
morgaŭ se tiele  
maljuniĝos mi solece  
perdos kion mi tre amas  
vento min posedos ne plu  
pluvo min vizitos ne plu  
en kora kampo mia  
ne okazos la retrorigardo al paseoj  
en ĉi primavero  
miaj amatino kaj amikoj  
mi per mia plum' kaj inko  
ŝirmos vin jen kontraŭ ĉiuj morboj  
mi deziras al ni ĝojon en sezon' printempa



*Elĉinigiŝ* **Fangfang (Ĉinio)**

**Mimoza Ahmeti**



**Vizio**

Ĉi tiun senvoĉan militon mi ne forgesos,  
Eĉ se iun tagon ĝi finiĝos  
Ĉi tiun militon per nevideblaj armiloj,  
Per fortoj, neesprimeblaj paroloj,  
Kaj ĉi tiun urbobuson...

Ĉi tiun urbobuson kien vi neatendite grimpis  
Kie malantaŭ la vitro oni spruĉis  
Kvazaŭ post obskurita vizio,  
Mirinda, tute sopirema,  
Kiel mangestis min, mangestis elmigrinto.



Kaj malfermis mi la manplaton,  
 Streĉigis ĝian liberon al kvin direktoj,  
 Salutis vin, kara, salutis,  
 Kiel en la lasta mondmilito.

## La Luno

Kiom multe interluktis mi kun la hieno,  
 vi ja ne scias!  
 Kaj kiomfoje mi interluktos ankoraŭ kun ĝi  
 Oni devas solvi: Kiu venkos kiun  
 Inter si kaj mi  
 Intertempe, ĝi denove alproksimiĝas,  
 Jen, vidu ĝin  
 Ĉirkaŭe kaj ĉirkaŭe, kaŝema, absorbema ĝi  
 alproksimiĝas!  
 Ĝiaj taktikoj jam min ruzigis!  
 Ĝia malfideleco mian rigardon pliakrigis!  
 La interluktado kun ĝi mian korpon  
 pliperfektigis!  
 Ĝiaj ekskorioj mian kuraĝon hardigis!

Flava hieno, flava hieno  
 Kun lazuretaj okuloj  
 Daŭre estas mia danĝera malamiko  
 La pruvilo  
 De mia rezistado.

## La lasta letero de Majakovski

Vagadas mi tra la vojoj vidi vin esperante,  
 Sed ne okazas ke ni unu la alian, kara,  
 trovante.  
 Timetas mi ĉu  
 Iunokte postdorse  
 Frapas min subite nigra mano  
 Sentas mi: nokto je revemaj steloj  
 Min mortigos  
 Nokto je ĝojlumaj steloj

En miaj okuloj, ĉiam, senĉese, blueske  
 Moviĝas via aprileca vizaĝo. Kaj tiun  
 matenon,

Mortigite, trovinte, min en iu stratofino,  
 La hazardaj preterpasantoj alproksimiĝos,  
 timigite,  
 Sed ne tuŝos ili mian korpon, ekvidinte  
 Al la okuloj,

Tie ili vian lazurluman vizaĝon distingante,  
 Kiu strange alrigardas ridante  
 Ekpensos la preterpasantoj indignante  
 Ke la murdisto vi estas,

Ekpensos tiel ĉar estas ja ili  
 Preterpasantoj  
 Kaj fervore, ne ŝparante, ili denuncos  
 Lastlaste, ankaŭ vin, kara, ili mortigos  
 La ĵurnaloj la opinion, certe kvietigos

La vera murdisto savixgos,  
 Kaj tutkvietita tra la ĉefurbo promenos.  
*Elalbanigis*



**Bardhyl Senimi**

(Albanio)

## El Ĉina Antikva Poezio

**Wang Changling (698-757)**

### Al imperia prokuroro CHAI

Fluas rekte al la urbo Wugang la rivero,  
 Mi kaj vi malĝojas pro disiĝa korsufero.  
 verda mont' kun nubo kaj pluveto nin  
 kunligas,  
 En du lokoj banas nin la sama luna helo

**Zhang Ji (vivanta ĉ. 753)**

### En boato ĉe acer-ponto

Luno sinkas, korvoj grakas en prujna vetero,  
 triste dormas mi sub fiŝistlampo ĉe acero.  
 Nokte el la templo Hanshan ekster l' urbo

Gusu  
sonorilaj tintoj ĝenas min sur la rivero.

*Elĉinigis* **Ardo (Ĉinio)**

**Yuan Jie (719—772)**

### *Ebria kanto sur la lago Shiyu*

La eta lago Shiyu, same kiel granda Dongting,  
Nun ŝvelas en somero ĉe l' helverda  
insulmonto.

La valo servas kiel glaso, kaj la lag' vinujo,  
Ĉi drinkemuloj jen sporade sidas en la rondo.  
Ne povas bari la vinotransporton de boato  
Eĉ tio, ke dum tagoj furiozas vent' kaj ondo.  
Ĉerpilon longan mi krukside tenas, kaj l' aliaj  
Ĉirkaŭe drinkas, nur ke estingiĝu desaponto.

**Du Mu (803 - 852)**

### **En gastejo**

En la gastej' mi restas sen kompano  
Kaj en kontemplo de melankolio.  
La frida lamp' pensigas pri paseo,  
Ekvekas min sovaĝansera krio.  
Tra jaro l' hejmletero nun atingas  
Afliktas min matene nostalgio.  
Ekstere ĉe l' nebula riverbordo  
ligitas fiŝboat' de l' familio.

**Liu Zongyuan (773—819)**

### **Ĉeroja situo**

De longe lacas mi de ofic-vesto kaj, degrade,  
Mi ĝoje iras al sudlando necivilizita.  
Ĉe bedoj foje mi najbaras en libera tempo,  
Kaj foje en montaro vagas kiel hom' ermita.  
Plugiĝas en mateno rosa l' herbkovrita kampo,  
Vespere en boato al mi sonas fluo glita.  
Ĉi tie mi renkontas ja neniujn vulgarulojn,  
Kaj kantas kun la kapo al ĉielo lazurita.

*Elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**

**Wang Anshi (1021-1086)**

—laŭ melodio *Sudlandano*

De antikveco oni fondas  
ĉi tie la palacon imperian,  
ĉar verd' de arboj, herboj ondas  
sub la vualo de l' vapor' favora.  
Ve, malfeliĉe oni desapontas  
pri neniig' de l' kvarcentjara sonĝo.  
Jam korteganoj mortis vane,  
iliaj tomboj grege sin renkontas.

Promenas mi laŭ riverbordo,  
kaj mi ascendas turon  
etaĝon post etaĝo kun streĉita forto.  
Pri l' historiaj faktoj de la dinastioj  
ne nepre ĉuu ja laŭ ordo.  
Direktu jen rigardon vian al la Longa  
Rivero,

kiu senĉese fluas malgraŭ ĉies sorto.

—laŭ melodio *Budhista dancisto*

Kelkaj pajlkabanoj jen rigardas  
rivereton en senĝena fluokuro.  
Mi vestite en negliĝo, kun malalta ĉapo,  
paŝas inter plorsalikoj en vent-lulo.  
Floroj same ruĝas kiel lastajare,  
nokta printemp-vent' karese blovas  
ilin jen al disflorado en plezuro.

Kiam la lunark' leviĝas al zenito,  
alte super arbopintoj,  
mi sobriĝas en malrapido  
pro tagmeza la drink-ebriiĝo.  
Kion mi prizorgas en medito,  
kun amemo? Nur sufiĉas unu aŭ du  
pepoj de la oriolo en ekscito.

**Yan Jidao (1030?-1106?)**

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Vekiĝinte el la sonĝo trovas mi,  
ke ŝlositas ĉiuj pordoj supre.  
Kiam mi sobriĝas el ebri',  
la kurtenoj pendas jen malalte.  
Lastajare la printempa apati'



ree venas al mi en la koro.  
 Dum florofalad' mi kun konsci'  
 sentas min izolata ja des pli.  
 En subtila pluvo paro da hirundoj  
 tamen flugas ame kun pasi'.

Je l' unua fojo mi ekvidis ŝin  
 en aroma rob' el luksa silko.  
 Ŝi, ludante bivon, kun kapklin'  
 kantis amrakonton dolĉe.  
 La tiama lun' ankoraŭ min  
 nun prilumas sur ĉielo,  
 dume tiutage ŝi reiris hejmen  
 same sub la luna ilumin'.



—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Tenante jadan tason ambaŭmane  
 vi jen proponis al mi komplezeme  
 vintrinkon, en vestaĵo luksa,  
 kun mola sent' ekstreme.  
 Mi spite ebriiĝon unuglute  
 fintrinkis vinon sendileme  
 ĝis ruĝis la oreloj.  
 Vi dancis, dancis ja senĝene  
 ĝis lun' malalten sinkis  
 al saliksuproj skuiĝantaj treme.  
 Finiĝis la kantad' mi eĉ ne povis  
 svingeti ventumilon fortosvene.

Ekde disiĝo mi sopiri emis  
 renkonti vin kun ĝoja sento.  
 Kelkfoje ni kuniĝas eĉ en mia sonĝo,  
 ĉu havas samon vi dum la momento?  
 Ĉinokte vere ni kunestas longe,  
 babilas sub lamplum' en evidento,  
 sed ni l' okulojn streĉas  
 por vidi zorge kun atento,

timante, ke ni renkontiĝus  
 vizie en la sonĝ' prezento.

*Elĉinigiŝ*



**Veĵdo (Ĉinio)**



**Zhuangzi**

ĈAPITRO DUDEK-UNUA

**Tian Zifang**

§21-06

Boli Xi donis nenian atenton al la rango  
 kaj la salajro, sekve grasiĝis la bovoj, kiujn li  
 bredis, kaj tial la duko Mu de la regno Qi  
 konfidis al li la regadon de la regno malgraŭ  
 lia malalta pozicio. La bravulo Shun donis  
 nenian atenton al la vivo kaj la morto, kaj tial  
 li havis grandan influon sur aliajn.

§21-07

Kiam la duko Yuan de la regno Song  
 ekhavis emon al pentrado, ĉiuj kortegaĵ  
 pentristoj kolektiĝis antaŭ li. Post kiam ili  
 ricevis la instrukcion kaj riverencis al la duko,  
 iuj el ili staris ĉirkaŭe, pretigante ĉiu sian  
 penikon kaj miksante sian inkon, kaj duono de  
 ili atendis ekstere. Iu el ili, kiu alvenis malfrue,  
 malurĝe paŝadis al li. Ricevinte sian  
 instrukcion kaj riverencinte al la duko, li ne  
 restis tie, sed sin retiris rekte al sia loĝejo. La  
 duko sendis vidi, kion li faras tie. La sendito  
 trovis la pentriston sidanta sur la mato kun la  
 kruroj krucitaj antaŭ si, nuda ĝis la zono.

Aŭdinte la raporton de la sendito, la duko  
 Yuan diris: “Tiu plaĉas al mi. Li estas vera  
 pentristo.”

## §21-08

Dum sia inspekta vojaĝo en Zang la reĝo Wen de la regno Zhou vidis maljunulon hokfiŝi sur la riverbordo. Tamen lia hokfiŝado ne estis efektiva hokfiŝado. Li tion faris ne por fiŝoj, sed por pasigi sian tempon. Li ĉiam estis tie, hokfiŝante por la hokfiŝado mem.

La reĝo Wen intencis dungi lin kaj konfidi al li la regadon de la regno, sed li timis, ke tio povos maltrankviligi liajn ministrojn kaj parencojn. Ĉe la dua penso li intencis rezigni la ideon kaj lasi lin foriri, sed li ne eltenis la penson, ke lia popolo estos senigita je tia ĉiela protekto.

Frue en la sekva mateno la reĝo Wen kunvokis siajn ministrojn kaj diris:

“En la lasta punkto mi sonĝis pri bona viro kun bruna vizaĝkoloro kaj barbo. Rajdante sur grizmakula ĉevalo kun hufoj ruĝaj je unu flanko, li donis al mi instrukcion: ‘Konfidu viajn regnajn aferojn al tiuj ĉi maljunulo en Zang, kaj via popolo estos liberigita de malfeliĉoj.’”

“Tio estas via karmemora patro de via moŝto!” diris la ministroj kun respekto.

“Tiuokaze, ni do konsultu aŭguriston,” diris la reĝo Wen.

“Ĉar ĝi estas la ordono de via karmemora patro, ĝi estas neniel dubebla. Kial do necesus la aŭgurado?” diris unuanime la ministroj.

Sekve la maljunulo en Zang estis eskortita al la ĉefurbo, kaj al li estis konfidentaj la regnaj aferoj. Li ne ŝanĝis la leĝojn kaj la regularojn, nek publikigis novajn. Post tri jaroj la reĝo Wen faris refojan inspektan vojaĝon en la tuta regno. Li trovis, ke la klikoj perdis siajn ĉefojn kaj disiĝis, ke la regnoficistoj ne plu laŭdas siajn meritojn, kaj ke komercistoj ne plu enkondukas falsajn mezurilojn el la najbaraj regnoj. La disiĝo de la klikoj indikis, ke la regpotenco centraliziĝis; la nelaŭdo pri siaj meritoj indikis, ke ĉiu el la regnoficistoj dediĉis al la komuna devo; la malaperado de la malveraj mezuriloj indikis, ke jam malaperis

trompemo en la rilatoj kun la aliaj regnoj.

Kaj tial la reĝo Wen faris la maljunulon sia granda majstro kaj, kun la vizaĝo turnita al la nordo, lin respektige demandis:

“Ĉu la maniero de nia regna regado povos esti disvastigita al la tuta mondo?”

La maljunulo el Zang restis silenta kaj ne donis respondon, kaj poste li foriris kun indiferenteco. Li donis ordonojn en la mateno, sed jam malaperis en la vespero, kaj de tiam oni aŭdis nenion pli pri li.

“Ĉu la reĝo Wen ankoraŭ ne akiris la perfektan fidon de la popolo? Kial li elpensis tiun sonĝon?” demandis Yan Hui Konfuceon.

“Silentu!” diris Konfuceo. “Diru nenion pri tio. La ago de la reĝo Wen ja estis perfekta. Kial vi ankoraŭ faras komenton pri li kaj kritikis lin? Per tiu sonĝo li nur portempe sekvis la kutimon de la popolo.”



*Elĉinigris*



**Wang Chongfang (Ĉinio)**

# Ĉineske

**Mandio (Ĉinio)**

## Persikfloroj ruĝas

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo\*

En

varma printempa mateno

radias  
bela flormien'.

Jen  
ekruĝas la floroj en  
la korto  
kaj en la ĝarden'.

Sen  
makuloj, sed kun purplen'  
ĝi ruĝas  
kiel la ruben'.

Jen  
persikfloroj sur la scen'  
fieras  
sub sunlum' sen ĝen'.

Sen  
ajna nebula katen'  
ĝi helas  
kvazaŭ sur saten'.

Mi  
amas kun ĝoja ebri'  
ĝin tree  
en vigla magi'.

Ĉu  
ŝi kaŝe venas sen bru'  
por ame  
ĉeesti kun ĝu'?

Mi  
komprenas, ke estas ŝi,  
vere ne  
mia fantazi'.



*\*Deskses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj  
de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

## Jadranka Miric (Serbio)

### Atendante vakcinon kontraŭ viruso "covid 19"

Februar'  
pasis rapide.  
Bela paro sidanta  
sur benko sub arb' ride.  
jen, vid- al -vide !

Suniĝas  
milde, tuttage.  
Briletas sunradioj,  
dum hundo bojas vage ,  
gaja saltetas mage.

Ekfloris  
krokusoj bluaj.  
Kiel lantern' ĝi lumas  
en la horoj vesperaj.  
Steloj kandelaj!

Migrantaj  
revenis birdoj  
al Nordo. Malkutime.  
Ekfloris rusaj pinoj  
de post cent jaroj!

Ekfloris  
eĉ, fimalsanoj.  
Korona virusoj, ve!  
Malpleniĝas urbegoj.  
Miloj da mortoj!

**ADIAŬO al neĝo!**

Ĉielaj

vintraj rozetoj.  
Jam floranta ĉielo  
Floras ĉerizarbetoj  
kun burĝonetoj.

Kvietas  
lagosurfaco.  
Alflugis insektoj sur  
boatoflago. Laco  
pasas en paco!

Nokte  
aŭdiĝas sonoj  
kvazaŭ dancantaj steloj  
bruetas aere. Voj'  
plenas de lumoj.

Venteto  
blovetas lace.  
Homoj ludas leĝere.  
iuj fiĝkaptas pace ,  
revas kurace!

Someraj  
varmejoj vintre  
dum korona pandemias.  
Zorgemoj kreskantaj are .  
Ruĝas luno re.

*\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna  
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo  
xa,xa,a (x=senrima).*

**Lin Qingxuan**

*Rekompenco de la tero*

Promenante en la kamparo, mi vidis kampulon hoĵi  
la teron kun granda peno. Delonge mi jam ne vidis

tian laboradon, do mi sidiĝis sur la kamprando por lin  
observi.

Lia fortika torso estis nuda. La pozo, kiam li levis  
alten la hoĵon, vidite kontraŭ la lumo, verŝajnis bronza  
skulptaĵo. Kia bela bildo!

Donante nenian atenton al mi, li nur zorgis pri  
hoĵado kaj ordigado de la tero. Li ebenigis la teron ĝis  
la malalta kampeĝo tuj ĉe mi. Mi vidis, ke lia korpo  
estas trempita de ŝvito kaj lia pantalono tramalsekigita.  
Li amike diris al mi, "Mi hoĵas por planti arakidojn."

Mi diris, "Jam antaŭ longe mi ne vidis iun uzi hoĵon.  
Nun oni faras tion per plugmaŝinon, ĉu ne?"

Li respondis, "Nur malgranda parcelo. Sufiĉas por  
mi finfari tion per hoĵo en unu tago."

"Ĉu vi volas iom ripozi?" mi demandis.

"Bone." Alirinte kun la hoĵo sur la ŝultro, li etendis  
la manon kaj elprenis grandan kruĉon el la herboj  
malantaŭ mi, kaj verŝis al mi tason da malvarma teo.

"Post unu monato vi povos vidi la verdajn  
terpomajn plantidojn. Tiam viaj okuloj kontentiĝos pri  
la bela bildo. Imagante al si la scenon post unu  
monato, li diris, "Mia avo diris, ke la tero ne trompas.  
Ĝi produktas tiom, kiom vi penas. La tero samas kiel  
homo. Se vi ĝin dorlotas kaj respektas, ĝi donas al vi  
rekompenco: flori kaj fruktdoni por vi. Tial mia avo  
asertis, ke oni kultas arbon por fruktoj kaj respektos  
hoĵon por rizo."

Aŭdinte tion, mi estis tre kortuŝita. De tiam, kiam  
mi paŝas sur la kampoj, mi povas vidi la rekompenco  
donitan de la tero. Kaj ankaŭ mi povas vidi, ke ĉiu  
floro havas la koron rekompenci sian koramikon,  
samkiel la tero.

*Elĉinigi*



**Jatina (Ĉinio)**

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

[www.elperno.cn/penlisto.htm](http://www.elperno.cn/penlisto.htm)